WIKIPEDIA

Tatara lingvo

Tatara lingvo estas lingvo de tataroj, la dua plej granda indiĝena lingvo de Rusio. Ĝi estas oficiala lingvo de la tatara aŭtonomio — Tatario.

En Rusio la tataran parolas ĉirkaŭ 5,3 milionoj, signifa parolantaro ekzistas ankaŭ eksterlande: en Germanio, Finnlando, Usono kaj aliaj landoj.

La tatara multe influis ĉiujn najbarajn lingvojn de la regiono, ankaŭ la rusan (en la rusa estas dekoj da pruntitaj el la tatara vortoj).

Tatara lingvo	
татар теле	
Parolata en	Germanio, Finnlando, Usono ktp.
Parolantoj	5 427 318
Denaskaj parolantoj	6,496,600 [1]
Fremdlingvo / dua lingvo por	multaj baŝkiroj
Skribo	cirila (en Rusio), latina (eksterlande; ankaŭ ĉefa en Interreto kaj oficia en Sovetunio ekde 1927 ĝis 1939), araba
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Tatario
Reguligita de	La Instituto de la Lingvo, Literaturo kaj Arto (ILLA) nome Galimĝan Ibrahimov de la Sciencakademio de la Respubliko de Tatario (http://www.ijli.antat.ru/language.html)
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	tt
ISO 639-2	tat
ISO 639-3	tat
SIL	tat
Glottolog	tata1255
Angla nomo	Tatar
Franca nomo	tatar

Enhavo

Skribmanieroj
- Latina alfabeto

Gramatiko
- Substantivo
  - Kazoj
  - Nombroj
  - Aparteno
- Adjektivo

Notoj

Vidu ankaŭ

Skribmanieroj

Pli detalaj informoj troveblas en artikolo Tatara alfabeto.

Ekde kiam la tataroj fariĝis islamanoj ili uzis la araban skribon. Ekde 1929 ĝis 1937 la latina skribo estis uzata. Ekde 1937 la tatara lingvo en Sovetunio/Rusio oficiale uzas cirilan skribon. Jen la tatara aboco surbaze la cirila skribo:

Ekzemplo de uzado de la cirila skribo, la supra teksto estas skribita tatare kaj la malsupra ruse. Kazano

А а	Ә ә	Б б	В в	Г г	Д д	Е е	Ё ё
Ж ж	Җ җ	З з	И и	Й й	К к	Л л	М м
Н н	Ң ң	О о	Ө ө	П п	Р р	С с	Т т
У	Үү	Ф	Х	Һ	Ц	Ч	Ш

Regionoj, kie loĝas tataroj

у	ɣ	ф	х	һ	ц	ч	ш
Щ	Ъ	Ы	Ь	Э	Ю	Я	
щ	ъ	ы	ь	э	ю	я	

Ekzemplo de uzado de la latina skribo. Kazano

Tiu ĉi literordo estas akceptita en la jaro 1997; antaŭe la literoj **Әә, Өө, Үү, Җҗ, Ңң, Һһ** estis metataj en la finon de la alfabeto.

8 jarojn antaŭe la ŝanĝo de la literordo oni planis aldoni al la tataran alfabeton la literojn **Ҟҟ, Ғғ** kaj **Ўў** por la sonoj q, ɣ, w (en la nuna cirila alfabeto oni skribas tiujn sonojn pere de **Кк, Гг, Вв/Уу**, tio faras la skribon tute malfonetika (ekz. **к**отла**у** qɔt'lɑw — **к**отла**в**ы qɔtlɑ'wɯ *gratul(ad)o*))

Latina alfabeto

Jen la latina alfabeto kiun oni planis ekuzi en la jaro 2000 sed oficie malpermesita en Rusio. Kvankam oficie oni ne plu uzas ĝin, neoficie ĝi kontinuas esti uzata: oni skribas la lernolibrojn kaj literaturon pere de ĝi ktp.[2]

A a	Ə ə	B b	C c	Ç ç	D d	E e	F f
G g	Ğ ğ	H h	I ı	İ i	J j	K k	Q q
L l	M m	N n	Ŋ ŋ	O o	Ө ө	P p	R r
S s	Ş ş	T t	U u	Ü ü	V v	W w	X x
Y y	Z z	'					

"Vosta" litero *N n*

Tiu ĉi alfabeto estas pli fonetika ol la cirila: al ĉiu litero korespondas nur unu sono. Ekzemple, *җәмгыять* (prononco ʒæmɣi'jæt) — *cəmğiət* . En la cirila skribo oni uzas la molan signon (ь) por montri ke *я* ne estas jɑ sed jæ kaj nenio montras ke *г* estas ne g sed ɣ.

Gramatiko

La lingvo estas aglutina — la vortradiko neniam ŝanĝiĝas se la vorto estas deklinata aŭ konjugata:

> *bala — bala**lar** — balalar**ıbız** — balalarıbız**ğa*** (infano — infanoj — niaj infanoj — al niaj infanoj)
> *yaz — yaz**u** — yazu**çı** — yazuçı**lar** — yazuçılar**ıbız** — yazuçılarıbız**ğa*** (skribu/verku — skribado/verkado — skribisto/verkisto — skribistoj/verkistoj — niaj skribistoj/verkistoj — al niaj skribistoj/verkistoj)

En la tatara la vortradiko ĉiam estas ankaŭ memstara vorto: *kil* — venu, *bügen* — hodiaŭ ktp.

Substantivo

La substantivo (*isem*) en la tatara havas 6 kazojn (*kileş*) kaj 2 nombrojn (*san*). Ankaŭ ekzistas gramatika kategorio de aparteno (*iəlek*).

Kazoj

La tatara lingvo havas 6 kazojn:

Kazoj	Afiksoj	Ekzemplo
Ĉefa kazo (*Baş kileş*)	—	*kitab* (libro), *süz* (vorto)
Apartena kazo (*İyəlek kileşe*)	*-nıŋ/-neŋ*	*kitab**nıŋ**, süz**neŋ***
Direkta kazo (*Yünəleş kileşe*)	*-qa/-kə, -ğa/-gə*	*kitap**qa**, süz**gə***
Akuzativo (*Töşem kileşe*)	*-nı/ne*	*kitab**nı**, süz**ne***
Elira kazo (*Çığış kileşe*)	*-dan/-dən, -tan/-tən*	*kitap**tan**, süz**dən***
Loktempa kazo (*Urın-waqıt kileşe*)	*-da/-də, -ta/-tə*	*kitap**ta**, süz**də***

Nombroj

La 2 nombroj uzataj en la tatara lingvo estas *singularo (berlek sanı)* kaj *pluralo (küplek sanı)*. La afiksoj kiuj indikas la pluralon estas *lar/lər*, *nar/nər* (la lasta nur estas uzata post *m*, *n*, *ŋ*): *kitap – kitap**lar*** (libro), *isem – isem**nər*** (nomo)

La pluralo en la tatara kaj en Esperanto uzeblas malsame: oni uzas la **singularan** formon se la substantivo estas uzata kun la vortoj *ber niçə* (kelkaj), *küp* (multaj), *əz* (malmultaj): *kelkaj libro**j** — ber niçə kitap*; *multaj ulo**j** — küp keşe*; *malmultaj viro**j** — əz ir (keşe)*. Ankaŭ **nur singularo** uzeblas se kiomo da objektoj estis indikata: *kvin vorto**j** – biş süz*; *dudek tablo**j** – yegerme östəl*; *naŭdek instruisto**j** – tuqsan uqıtuçı*

Aparteno

Ankoraŭ unu gramatika kategorio, kiun havas la tatara lingvo, estas *aparteno (iyəlek)*.

Pronomo	Afiksoj (je vokalo)[1]	Afiksoj (je konsonanto)[1]	Ekzemploj (je vokalo)[1]	Ekzemploj (je konsonanto)[1]
Mia (*minem*)	*-m*	*-ım/-em*	*taqta**m**, keşe**m*** (*taqta — tabulo*, *keşe — ulo, persono*)	*kitab**ım**, süz**em***
Via (singulare; *sineŋ*)	*-ŋ*	*-ıŋ/-eŋ*	*taqta**ŋ**, keşe**ŋ***	*kitab**ıŋ**, süz**eŋ***
Lia, ŝia, ĝia (*anıŋ*)	*-sı/-se*	*-ı/-e*	*taqta**sı**, keşe**se***	*kitab**ı**, süz**e***
Nia (*bezneŋ*)	*-bız/-bez*	*-ıbız/-ebez*	*taqta**bız**, keşe**bez***	*kitab**ıbız**, süz**ebez***
Via (plurale; *sezneŋ*)	*-ğız/-gez*	*-ığız/-egez*	*taqta**ğız**, keşe**gez***	*kitab**ığız**, süz**egez***
Ilia (*alarnıŋ*)	*-sı/-se*	*-ı/-e*	*taqta**sı**, keşe**se***	*kitab**ı**, süz**e***

[1](je vokalo/konsonanto) — t.e. okaze ke la vortobazo finiĝas je vokalo/konsonanto.

Adjektivo

En la tatara lingvo adjektivo (*sıyfat*) uzeblas same kiel substantivo. Tiukaze ĝi havas la samajn gramatikajn kategoriojn kiel substantivo: *Keçkenəgə rəxmət əyttelər — Oni dankis al la etulo*. La vorto *keçkenə* ĉefe signifas *eta*; tamen, pro manko de substantivo, kiu povus esti rilata al *eta*, ĝi mem ricevas substantivajn funkciojn, tial ankaŭ la afikson *-gə* kaj la signifon *etulo*.

La adjektivo (ne funkciata kiel substantivo) en la tatara havas la gramatikan kategorion de *komparaciaj formoj* (diminutivo estas ankaŭ unu el ili)

Komparacia formo	Afiksoj/Partikloj	Ekzemploj
Pozitivo	—	*aq* (blanka); *al* (helruĝa); *yaxşı* (bona), *biek* (alta)
Komparativo	*-raq/-rək* ktp.	*qızılraq* (pli ruĝa); *naçarraq* (pli malbona); *biegrək* (pli alta)
Superlativo	*iŋ* (la plej); *bik* (tre); *ütə* ktp.	*iŋ yaxşı* (la plej bona); *bik zur* (tre granda); *bik qızıq* (tre bone/bele/interese), *iŋ biek* (la plej alta)
Diminutivo	*-ğılt/-gelt, -qılt/-kelt, -sı/-se, -su* ktp.	*aqsı* (blanketa); *qızğılt* (ruĝeta); *alsu* (helruĝeta)

Notoj

1. ↑ [1] (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=tat)
2. ↑ Rimarko: En tiu ĉi artikolo estos uzata la latina alfabeto, sed anstataŭ *Ѳѳ* la litero *Öö* estos uzata pro malbona subteno de la ĝusta litero.

Vidu ankaŭ

- Tatara patriota fronto Altin Urda

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tatara_lingvo&oldid=6923387"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:54, 25 mar. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.